ISSN 0299-092X

Numero 79

Decembro 2003

Kvaronjara

1,25 €

monda solidareco

Esperant - lingva eldono

Informilo de «Monda Fonduso de Solidareco Kontraù la Malsato»



# Alia civitaneco

La demokrata aktualeco de Monda Fonduso malofte estis tiel densa kiel nun : en oktobro, ni partoprenis oficiale kaj unuafoje en Plena Kunsido de la Kongreso de la Popoloj. En novembro, ni estis engaøitaj en preparado kaj partoprenado en pluraj aspektoj de Eýropa Sociala[1] Forumo, kaj post kelka tempo, tuj kiam la lokaj kondiæoj ebligos øin, okazos la unua okcidentafrika Øenerala Asembleo de Monda Fonduso.



Ili estas tri eventoj nete apartaj, ne kompareblaj pri celoj, investitaj rimedoj, kaj koncernataj kulturaj medioj, sed kiuj evidentigas certan ideon de socia vivo. Ja balotilo estas unua indico pri demokratio, sed ne sufiæa. Kiomfoje ni vidis demokration konfiskita de tiuj mem, kiuj ricevis mandaton ? premoj el multaj specoj sur la elektitojn estas tiaj, ke ili apenaý povas gardi la direkton de kampanjaj promesoj. Konate. Fronte al tiu risko aý al tiu realeco, *izolbudo ne staras kiel atingejo de la civitana klopodado, sed kiel vera ekirejo de socia aktiveco kohera kun la voædono.* Tiu sociala aktiveco povas ampleksi diversajn formojn ekde loka interhelpado øis debatoj aý antaýenpuþo de universalaj valoroj, pasante tra æiaj asociaj, sindikataj aý politikaj engaøiøoj. Kaj finfine tiu sociala aktiveco aperas kiel vera proponforto al la politikaj aý ekonomiaj responsantoj, por ke de la proponoj naskiøu leøoj kapablaj certigi harmonian progreson de la homaro.

Jen fakte la mesaøo, kiu estiøas el la diversaj socialaj forumoj æu mondaj (Porto Alegre, Mumbai) æu regionaj (Afrika, Eýropa...). Ankaý al tio ekpaþis la Kongreso de la Popoloj decidante pri la kreado de *Konsultiøa Asembleo*, kiu invitos same la partnerajn organizojn kiel la civitanan esprimon per konstantaj aý temaj forumoj. Kaj æu tio ne estas ankaý la klopodo de la okcidentafrikaj mondfondusanoj ? Ekde la Federacia Asembleo de *Abomey-Calavi*, en Aýgusto 2000, stariøas procezo por ke la mondfondusa vivo organiziøu kaj por ke la regiona Øenerala Asembleo de 2004 en Vagaduguo rolu kiel proponforto al la Administra Konsilantaro.

200 jarojn post la malrapida retrovo de la universala balotado, 100 jarojn post la rekono de la rajto je libera asociiøo, la civitano estas akiranta novan statuson. La « *Regato* », kiu øi estis ankoraý, eæ kun voædonrajto, fariøas plena civitano, « *Partoprenanto* » kun kiu la responsantoj devas de nun kalkuli.

*Daniel Durand*

## Enhavo

Frontartikolo ........................ p.1
Kongreso de la Popoloj, ......... p.2
GMO aŭ ne GMO ?............... P.3
GAK en Kokokoĝi................. p;5
BCEBI en Benino .................. p.5
Guemnati en Gonse ............... p.6
Yancadi en Padema............. p.6-7
Mondfondusa vivo................ p.7
El la kalendaro ...................... p.8
Kolofono, ........................... p.8

1.sociala : estas tie æi komprenata kiel : rilata al la atento de la civilaj kaj þtataj organizoj pri la vivkondiæoj kaj la estonteco de individuoj. En tiu senco la Eýropa forumo estis ne "socia" sed "sociala".

# E§oj el Kongreso de la Popoloj

*J*am de longe en nia bulteno ni ne parolis pri la Kongreso de la Popoloj. Necesas diri, ke dum deko da jaroj øi pli malpli dormetis.

Henri CAINAUD, unu el la elektitaj Delegitoj, pro la peto de la Øenerala Sekretariino Renée MARCHAND, konsentis pri laboro por relanæi la aktivecon de la Kongreso de la Popoloj. Tiucele du kunvenoj estis organizitaj kun helpo de Registrolibro de la Mondcivitanoj, la unua en Dabo (Mozelo) en septembro 2002, la dua en Di‼ono en marto 2003. Kaj tie ekfunkciis la regula procezo al Plena Kunsido de la Kongreso de la Popoloj, kiu okazis la 25an, 26an kaj 27an de lasta oktobro en Parizo.

La unua tempo de tiu Plena Kunsido temis pri larøa situacia konstato de la demokrata tutmondismo. Tiucele invitoj estis faritaj kaj multaj organiza‼oj jese respondis : Internacia Konsilio por Tutmonda Aýtoritato pri Medio *CILAME*, Mondfederaciistoj, Tutmondista Konstanta Komitato (federacianta dekkvinon da organiza‼oj), esperantistaj organiza‼oj el kiuj Esperanta Civito, Instituto por Tutmondismaj Studoj... kaj kompreneble Monda Fonduso de Solidareco Kontraý la Malsato.

La dua tempo atingis plurajn gravajn decidojn, el kiuj novan balotelektan sistemon por la Kongreso de la Popoloj, kaj kreadon de *Konsultiøa Asembleo* æe la Kongreso de la Popoloj. Por validiøi, tiuj decidoj estu ankoraý submetitaj al kelkaj perkorespondaj voædonoj ; ni do atendos por ilin prezenti pli detale.

La kompleta protokolo de la Plena Kunsido de la Kongreso de la Popoloj (20 paøoj) estas havebla en Esperanto (mallongige), franca aý angla æe la butena adreso.

*DD*

## Kio estas la Kongreso de la Popoloj ?

Øi estas elektitaro reprezenta de la monda loøantaro, aý almenaý de ties malgrandeta parto, kiu enregistriøis en la mondaj listoj de voædonantoj. La ideo pri tutmonda asembleo devenas de la dudekaj jaroj. Realigo estis provita unuan fojon fine de 1950- komence de 1951 dum Asembleo okazinta en Øenevo, kiu malsukcesis, kaj duan fojon en 1963 en Bruselo dum kongreso, kiuj kunvenigis la æefajn tiamajn tutmondistajn organiza‼ojn. Tiu Brusela Kongreso lanæis procezon, kiu rezultigis unuan transnacian balotelekton en 1969 ; poste balotelektoj sin sekvis øis la deka en 1998. Pro tiuj balotelektoj, kiuj koncernis æirkaý 100.000 voædonantojn en 120 landoj, la Kongreso de la Popoloj entenas nun 20 elektitajn Delegitojn kaj 20 anstataýajn Delegitojn.

*Kiuj estas la misio kaj rolo de la Kongreso de la Popoloj ?*

La æefa misio de la Kongreso de la Popoloj estas malfermi vojon al tutmonda demokratio. Øia fina celo estas la konsistigo de Monda Konstitucia Asembleo. Sed ne atendante tian rezultaton la Kongreso de la Popoloj publike deklaracias pri aktualecaj aferoj, kiuj endanøerigas la estontecon de la homa komunumo kaj de la planedo ; øi povas starigi aý aprobi instituciojn por laboro de pripensado aý de agado pri la gravaj mondaj problemoj. Øi povas ankaý prilabori aliajn mondutilajn taskojn.

*Kiu estas la situacio de Monda Fonduso en tiu procezo ?*

Monda Fonduso de Solidareco Kontraý la Malsato devenas de komisiono « Malsato kaj Disvolviøo » de la Mondcivitanoj. Statuto estis redaktita komence de la jaro 1982, kaj en septembro de la sama jaro, dum Plena Kunsido en Brighton Monda Fonduso ricevis la konsenton de la Kongreso de la Popoloj pro øia mutualisma kaj tutmondisma karaktero.

## AtentigoJ al la ge-globidaranoj :

Du þanøoj pri la abonado kaj la distribuado de Monda Solidareco.

1. En tiu jara komenco, vi æiuj preparas vian kotizon 2004. Nu ! ni petas vin bone indiki dum via alsendo "*kotizo kaj abono*". La regado de la bulteno konsistigas devigan specialan æapitron de niaj kontoj kaj gravas bone precizigi, ke via pago inkluzivas la abonon de Monda Solidareco. Dankon.

2. Averaøa prezaltiøo de 42 % de la poþtaj senda‼oj al internacio devigas nin, por þpari monon, sendi la bultenojn al samdistriktaj grupoj per unika poþta‼o sendata al ilia subtenorganiza‼o. La responsantoj de tiuj NÞO aý membroj de la prizorgaj komitatoj, laý oportunoj, disdonos la ekzemplerojn de Monda Solidareco dum siaj renkontoj kun la membroj de la grupoj.

La animado de Monda Fonduso estas aktiveco temporaba por la volontuloj. Malfacile por ili samtempe plenumi aliajn aktivecojn, kiuj ankaŭ trudas siajn proprajn devigojn. Tion spertis nia administranto Claude Tellier, kiu elektis eksiĝi el nia Administra Konsilantaro por pli bone sin dediĉi al artistaj aktivecoj, kiuj postulas multe da ĉeesto. Kompreneble li daŭre restas fidela Globidarano kaj povos alporti al ni okazajn helpojn. Bonan ŝancon al li !

Dume nia amiko Jean-Pierre BOURE fariĝis Adjunkta Ĝenerala Sekretario kaj du globidaranoj eniras la redakcian komitaton : Alain BAL kaj Abdoulaye HOTTO.

*La Øenerala Sekretariino Danièle Charier*

# GMO aŭ ne GMO ?

**Maltrafa demando ! (sekvo)**

*En Monda Solidareco numero 78, ni provis simplan klarigon pri transgenetiko por ekhavi opinion pri la problemo de la transgenetikaj organismoj, nomitaj "GMO" (genetike modifitaj organismoj). Hodiaý ni pasas de la scienca kono, kiu ebligas manipuli viva‼on, al la teknologia aplikado, kiu rilatas kun la uzado, kiun oni faras el tiu kono. Kaj tie aperas la perversioj... Kial ?*

Ni tuj diru, ke la þlosilo, kiu malfermas la rigardadon sur æio, kio sekvas estas jena : transgenetiko multe kostas ! Multe kostas pri farscio, pri ekipoj, pri aløustigoj, pri kontroloj.

Nu por pasi al teknologia stadio de grandskala produktado, necesas multege investi : nur gravaj plurnaciaj societoj kun helpo de bankoj havas rimedojn tion fari. Kaj fakte la tuta produktado de la transgenaj organismoj tra la mondo kuþas nun inter la manoj de kvin el tiuj societoj. Tiuj æi ne estas, malgraý la reputacio, kiun ili seræas ekhavi, homamaj societoj agadantaj por la bono de la homaro. Ilia celo estas unue estigi kiel eble plej rapide profitojn, sub la preteksto, ke por lanæi novan produkton ili prenas riskon, kiu pravigas rapidan kompenson de la investoj.

Do ili sercas agi rapide... tro rapide, æar el tio fluas serio da konsekvencoj, kiuj estas almenaý alarmigaj. Ni mallonge pristudos kelkajn, sciante ke la spaclimo de nia prezento devigas nin elekti la plej videblajn.

1/ Kiu utileco ? La æefa demando laý ni, kaj la malpli traktita en la gazetaro jenas : transgenaj organismoj por kion fari ? Alimaniere dirite, kiujn novajn karakterojn enigi en kiujn kultivatajn aý bredatajn variojn por respondi al realaj bezonoj kaj estigi senteblajn progresojn ? Æu niaj mondfondusaj amikoj ne dezirus disponi pri varioj de pluva rizo kun alta rendimento, rezistaj al malsanoj kaj nematodoj ? aý pri varioj de maizo aý de fazeoloj resistaj al sekeco aý al salhaveco ? aý pri varioj de ignamo aý de manioko riæaj je nutraj proteinoj ? aý pri zebuaj rasoj, kiuj produktus multe da bona lakto ? Certe, æu ? Nu, proponojn de transgenetiko en tiu senco æu oni vidas ? ne ! ne sufiæe profitodona... La fabrikistoj interesiøas æefe al la "portantaj" merkatoj de la riæaj regionoj modifante maizon, sojon, kolzon, tomaton, ktp. laý karakteroj, kiuj neniel rilatas al la bezonoj de la malriæaj regionoj. La karikaturo de tiu konduto estas la kreado de kulturvarioj rezistaj al totala herbicido : tio reprezentas neniun plibonigon de la ekologiaj kapabloj aý eæ de la koncernataj plantoj, sed tio certigas la øeneralan utiligon de tiu herbicido... produktita de la sama firmao je prezo tro kosta por la sudaj savanoj[1].




2/ Blinde ! Tuj post la elekto de la tekniko por fabriki la transgenajn organismojn, la plej rapida maniero ("bombardado" al celæeloj de la "plibonigota" organismo per la novaj elektitaj genoj, el partiklo-bombardilo) estas ofte preferata ol maniero pli preciza (enigo de novaj genoj per biologia vektoro, ekzemple per bakterio).

Rezultas el tio, ke la enigo de la novaj genoj en la celæelojn okazas hazarde : kiam la enigo sukcesas[2], oni ne scias kie precize lokiøas la novaj genoj en la kromosomojn, nek po kiom. Kaj oni ne scias, æu tio povas efiki sur la globan biologian funkciadon de la æelo kaj de la organismo...

3/ Skuege ! Transgena organismo estas nova viva‼o, kies enkondukon en agran, bredan aý akvan medion oni devas zorge priatenti : øian efikon sur la vivantan medion oni ne apriorie konas. Necesas do zorgeme kaj longe observi tion, kio okazas antaý ol disvastigi kaj øeneraligi øin. Tiu malrapida prudenteco neakordigeblas kun la postulo de tuja financa rendimento de la firmaoj, kiuj produktas tiujn organismojn. Nu okazas, ke la nekontrolata dissemado de la novaj karakteroj ekde la transgenaj plantidoj al sovaøaj planto estas klare timeginda, æu pro la naturaj interspeciaj krucadoj, æu tra la bakteria flaýro de la grundo. En tiu kazo, æu oni bone imagas la konsekvencon de la dissemado de karaktero ekzemple[3] pri rezisto al herbicido. Aliflanke æu oni bone imagas, pli øenerale, la efikojn sur la biodiversecon de la enkoduko de organismo kiam øi prezentas fortajn konkurencajn avantaøojn[4].

4/ Kaj pri nia sano ? Ni konfesu, ke la temo pri homa nutrado estigas la plej malpravajn fantasmojn, tiom malmulte probable estas, ke la karakteroj sur kiujn portas la transgenetiko estas ligitaj al homa tokso. Sed la nutraj kutimoj staras inter la plej rigidaj kulturaj trajtoj[5], tial ekzistas notendaj psikologiaj rezistoj. Tamen la enkonduko de nekutimaj proteinoj en la vegetalaj aý animalaj nutrofontoj destinitaj al homo povas estigi, æe kelkaj personoj, alergiajn netolerojn malfacile antaývideblajn, æar temas pri tre individuaj reagoj, kies determinismo estas ege kompleksa. Temas pri øenerala medicino, malfacile priparolebla.

5/ Æu nova formo de ligita laboro ? Same kiel pri hibridaj semoj el unua generacio (la "F1-hibridoj") agrikulturo ne povas destini parton de sia rikolto de transgenaj grajnoj al resemado de siaj kampoj dum posta sezono. Fakte, aý tiuj semoj fariøas multe malpli produktivaj, aý ili estas tute ne fekundaj. Do necesas reaæeti novajn æiujare, tre koste. Krome, la elekto valorigi tiun kostan prezon de la semoj estas ligita al tiu intensigi sian kultivon per grandaj alportoj de agrokultivaj necesa‼oj kaj de mekanikigo al altaj rendimentoj.. nu ! ofte la sama firmao produktas la transgenajn semojn kaj necesa‼ojn : oni vidas iom post iom skiziøi modelo de fakprofesiaroj

sinen de kiuj agrokultivisto estos lokita per kontrakto kun firmao, kiu provizos øin per semoj kaj necesaĵoj, trudos al li produktan planon pri la kultivaj zorgoj kaj aæetos lian produkton por ties agronutra transformado. Fariøinte liveranto de servoj, la agrokultivisto estos perdinta sian memregadon pri decido kaj faro same kiel sian rolon de reganto de la kampara areo : el tiu vidpunkto, jen programita morto de la tradicia agrikulturo, kiu vivtenigas ankoraý la plej grandan parton de la monda loøantaro kaj kiu tenas la agroekologiajn spacojn ankoraý traviveblaj.

6/ Ankoraý pli malbone en sudo ! Pli malbone æar ne nur la Esplorado en la riæaj regionoj disdegnas la transgenajn solvojn, kiuj povus plibonigi la vivtenajn produktojn de sudo, ne nur la transgenaj teknikoj estas finance nealireblaj de la sudaj landoj, krom per plukreskigo de sia neeltenebla þuldiøo, sed ankoraý æar kurantaj bioteknologiaj esploradoj celas tute simple la kreadon en nordo de produktoj anstataýigaj de la sudaj, kiel kakao, kafo, kotono, sukero aý vanilo. Pli malbone ankaý æar la trudata komercliberigo jam atingas superþuton de la sudaj merkatoj per varoj, transgenaj aý ne, kiuj malmultekoste konkurencigas la lokajn produktojn.




Do jen rapide skizita la posta medalflanko "transgenetiko". La antaýa flanko estis kona scienco, la posta flanko estas produktiva teknologio. Inter ambaý, la dikeco ne tre certas. « *Scienco sen Konscienco nur ruinigas animon* » diris Francisko Rabelezo[6], kiun de nun oni povas parafrazi jene : « *Teknologio sen etiko ruinigos la homaron* ».

La fundamentaj donitaĵoj de tiu grava situacio estas unuflanke la kontrolo fakte suverena de la transnaciaj societoj pri esplorado[7] kaj investado, aliflanke la mirinda praktiko de la patentado de vivaĵo. Tio æar en la nuna ekonomia sistemo æiu bioteknologia invento patentiøu por komerca garantio. Kaj kvankam tiu invento koncernas nur la regadon de iu gena informo, fakte la fizika portanto de la informo, do la geno, fariøas por longa tempo propraĵo de la inventinto.

Nu tiel konsistiøas nekredebla friponaĵo, æar æiuj genaj ekipoj de æiuj estuloj antaýekzistis ol homa teknologio ! neniam iu fabrikis genon. En transgenetiko, la teknologio nur plurobligas kaj translokigas øin : la invento estas nur procedo. Kvazaý iu ino, kiu instruus al siaj amikinoj novan teknikon de preparado de maniokaĵo, devigus ilin pagi al þi, krom þia instruado, la tutan maniokaĵaron, kiun ili fabrikos dum dudek jaroj trudante ilin ne fabriki øin alimaniere !

Friponaĵo des pli grava, ke øi metas la longtempajn homarajn bezonojn inter la manojn de kelkaj firmaoj, kies privataj interesoj estas planeblaj nur kurtperiode. Nur senpripensulo povas imagi, ke la øeneralaj bezonoj povos estis kontentigataj laý la apartaj interesoj de teknologia oligarkio, kiu arogas al si kvazaý monopolan situacion.

Klare, pri transgenetiko same kiel pri aliaj globaj tekonologioj, la mondo surkape marþas. La afero ne temas pri la transgenetika scienca principo, sed pri la kondiæoj de øia teknologia kaj komerca efektivigo. La demando "æu por aý æu kontraý la GMO" ne estas øusta. Indas nek konfuzi maniokaĵon kaj la kaserolon, en kiu øi kuiriøas, nek « *ĵeti la bebon kun la banakvo* ». La øusta demando estu : "Kia transgenetiko, por kiu, kiamaniere ?"

Ni respondas, ke de nun ne plu estas ebla globa teknologia progreso sen øenerala civitana planedskala mastrado de æiuj stadioj de la procezoj de esplorado, decido, efektivigo. Travidebleco kaj kontrolo de la celoj, de la metodoj kaj de la esplorrimedoj. Travidebleco kaj kontrolo de la celoj, de la metodoj kaj de la rimedoj de tekonologia disvolviøo.

Vasta programo, kiu postulas antaýaĵon : mondskale organizi la civitanecon tiamaniere ke la homaro fariøu kapabla taski al si tiun mastradon de sia propra destino (vidu la frontartikolon de Daniel Durand). Tio ne plu estas utopia, kiel atestas la stariøo de la monda civitana movado tra la mondaj socialaj forumoj. Ja tio ankoraý prokrastiøos. Tial, atendante, tri damaøevitaj decidoj eblas al la aktivaj soci-ekologiaj movadoj :

1/ deklari nepropprigebla la mondan genetikan riæofonton, kiel komunan havaĵon ne nur de homaro, sed de æiuj estuloj. Tre rapide reformi la leøarojn pri patentoj en tiu perspektivo, kun frostigo de la kurantaj patentoj.

2/ submeti æiun socian decidon pri transgenetiko sub duopan kontrolon : parlamenta kontrolo en la demokrataj landoj, kie la civilsociaj kontraýpovoj agadas, kaj kontrolo de biosekureca agentejo kreota sine de UN.

3/ garantii teknikan kaj ekonomian alireblon al la transgenetikaj organismoj utilaj al la plej malriæaj loøantaroj konsiderante la apartajn bezonojn de la kamparanaj agrikulturoj, de la agropaþtista socioj, de la metia fiþkaptado.

*Alain Cavelier*

---

1.sen konsideri, ke trakti dekmilionojn da hektaroj per totala herbicido þajnas ekologie stultega.
2. Øi ne æiufoje sukcesas... el kio la neceso ligi al la "utila"geno aliaj genon, nomitan "markanta", kiu ebligas rapide konstati la sukcesintajn transmetojn. Kiam tiu markanta geno kodumas por antibiotiko kiu estos tiel dislanæita en la naturon, oni vidas ekaperi novaj mediaj problemoj pri publika sano.
3. Ekzemple, transgena kolzo rezista al la herbicido "*glyphosate*" povas transdoni tiun reziston al multaj sovaøaj kruciferacoj.
4. Kelkaj transgenaj fiþoj malaperigas pro ilia premo sur la nutraj fontoj multajn speciojn malpli viglajn ; transgena maizo rezista al pirala raýpo estas toksa por aliaj neparazitaj lepidopteroj.
5. Oni povas demandi nian amikon Christian Trianneau kiom multe li þatas manøi frititajn raýpojn kiam li vojaøas en Sahelo...
6. François Rabelais, franca verkisto de la 16a jarcento.
7. Nun neniu publika laboratorio havas rimedojn por daýrigi sendependan esploradon pri transgenetiko : æiuj laboras kontrakte kun unu aý pluraj privataj firmaoj, kiuj æar ili alportas monon, kompreneble premas sur la esploran celigon kaj la diskonigon de la rezultatoj

# Kio pri la projektoj ?

## Benino

### Raporto pri la agadoj de GAK

(projekto n°96.01.BJ)

*Ni ricevis de la Grupo Agrikultura de Kokokoøi (Benino) la jenajn novaĵojn pri øia kokinbreda projekto financita de Monda Fonduso. Oni substrekos la flekseblon de adaptiøo de la grupo, kiu ne hezitas komenci novajn agadojn laý la cirkonstancaro, kaj ankaý la dinamismon iniciatitan de la komenca projekto, æar GAK eltrovas novajn subtenojn laý la akiritaj sperto kaj rezultatoj. Ankoraý speco de kvalita efiko de niaj etaj projektoj, kiuj ne taksiøas je frankoj aý eýroj !... Bonege, GAK !*

La jaro 2003 komenciøis kun la starigo de novaj iniciatoj por la Grupo Agrikultura de Kokokoøi (GAK). La bredado de kokinoj aperas hodiaý kiel malfacila kaj tre konkurenca aktivado. Surmerkate estas miloj da bredistoj en la æirkaýaĵo de Cotonou kaj proksime de GAK. Al tio aldoniøas la importataj produktoj de Lagos (Niøerio). Fronte al tiu malfacila situacio, kiun ni transiris, ni organizis pripensajn kunsidojn pri la estonteco de nia asocio. Post la kunsidaj laboroj, decidoj por la redirekto de la agadoj estis adoptitaj :

- Ø Revigligi la aktivecojn,
- Ø Redirekti la agadojn al aliaj merkathavaj birdobredaj fakoj
- Ø Æion fari por valorigi la mondfondusan sperton.

Tial la bredado de kokidoj, anasoj, meleagroj kaj innikloj estis projektata. Sed kie trovi monon ? Ni informiøis æe lokaj mikrofinancaj institucioj. Pro niaj spertoj, PADME (Projekto por Apogi la Disvolviøon de Malgrandaj kaj Mezaj Entreprenoj) konsentis pruntodonon de 1.000.000 CFA F t.e. proksimume 1.525 eýroj repageblan en unu jaro kun interezo de 14 % por komenci la novan projekton. Per tiu financa apogo kaj la alporto de propra kontribuo la grupo aæetis 360 kokidetojn recikleblajn æiun duan monaton, 200 koketojn recikleblajn æiun sesan monaton, dudekon da anasidetoj, dekon da meleagridetoj. Tiuj produktoj celas senpere la konsumadon en la restoracioj, hoteloj... Tiucele ni iniciatis reklamojn æe niaj eblaj klientoj. Tiamaniere nun ni fariøis provizantoj de la flughaveno, kien ni liveras niajn produktojn. Ni mem buæas kaj ensakigas la kokidetojn.

Ni ĵus sukcesis nian unuan provon. La rezultatoj estas kuraøigaj por la sekvo.

Ni daýre bredas la kokinojn, sed subtenate de la aliaj bredoj. Nun ni produktas potage averaøe 10 platojn de 30 ovoj, el proksimume 400 kokinoj.

Ni aktive preparas la jaran finon kaj esperas plinombrigi la bestaron, æefe ni projektas intense elvolvi la kokan produkton pro nia kliento en la flughaveno de Cotonou. Por tio ni redaktis projekton senditan al ADF (Afrika Disvolviøo-Fondaĵo), kiu interesiøas sed ankoraý ne anoncis sian favoran konsenton.

*Nathalie JOHNSON*
*Sekretariino de GAK*



### kortbesta bredado de BCEBI

Projekto n-ro 01.02.BJ

Temas pri projekto de besta produktado kun duopa funkcio : pedagogia kaj ekonomia, en la bien-lernejo de Huili de la NÞO BCEBI/*CBDIBA*[1]. Decidite la 29an de junio 2003 la financado de la unua parto de tiu æi projekto realiøis la 10an de septembro 2003. Tiu unua parto entenis la konstruadon kaj ekipadon de kokbredejo (2 konstruaĵoj) al kio aldoniøas kuniklejo kaj alia ejo por kokidetoj. Tiu aldoniøa evoluo spegulas tiun de la postulo de la loka merkato kaj interalie tiun de la precipa kliento de BCEBI : CIKMA / *CIFAP*[2]:.

La aferoj iris viglege, æar tiu unua parto finiøis komence de oktobro. Fakte la laboroj komenciøis antaýe per investo de propra kontribuo de BCEBI, kiu deziris, ke tiu projekto estu preta antaý la jarfino. Tiel praviga la dua financoparto estis øirita la 15an de oktobro. La lanæo de la bredadoj estas do tuja, kaj ni petos de Patrice LOVESSE, la direktoro de BCEBI finan raporton pri plenumado kaj artikolon por niaj legantoj.

*Alain Cavelier.*

---

1. BCEBI/CBDIBA : Benina Centro por la Evoluigo de la Bazaj Iniciatoj
2. CIKMA / *CIFAP*Centre d'Initiation et de Formation à l'Auto-promotion : Centro por Inicado kaj Klerigado al Mem-Antaýenpuþo CIKMA

**Burkinio**

# Bredado de hejmaj ŝafoj en Burkinio :

## La ina grupo Guemnati en Gonsé

Projekto n-ro 02.01.BF

Guemnati estas la nomo de Pula ina grupo en la vilaøo Gonse je 25 km de la burkina æefurbo Vagaduguo, sur akso Vagaduguo-Kupela. Tiuj inoj estas mastrumantinoj. Devenantaj de nomadaj familioj, la Pula grupo Guemnati sin instalis en la periferiajn savanojn de Gonse. Tradicie ili vivtenas el la bredaj enspezoj, kaj de antaý nelonge el agrokultivaj enspezoj.



Fakte la paþtejoj de la protektata arbaro de Gonse estis alireblaj al la bredistoj, kiuj rajtis paþti siajn bestojn. Sed nun la arbaro suferas tropaþtiøon, æar novaj paþtistoj instaliøis æirkaý øin, pro kio la aýtoritatoj aranøis kelkajn subpremajn decidojn. Tial la membroj de la grupo decidis praktiki hejman þafan grasigon, kiu prezentas avantaøon eviti al la bestoj longajn migradojn kaj ebligas proksimecan gardadon. Tiu klopodo partoprenas en la lukto kontraý la besta disvagado malutila al loka evoluigo.

La þafbredado praviøas kiel fonto de animalaj proteinoj destinitaj al la homa konsumado. Praktikite ekde la fruaj tempoj la bredado emas kreski æi tiujn lastajn jarojn precipe pro forta postulo æefe dum festaj periodoj (*Tabaski*, Ramadano, nuptoj kaj naskiøaj ceremonioj). Krome la postulo de marbordaj landoj (Eburio, Ganao, Togolando) multe kreskis, superante la proponon de la produktantaj landoj (Burkinio, Niøero, Malio) pri vianda¼oj.

Tial la faka politiko pri bredado kuraøigas multobligon de malgrandaj produktunuoj, kiuj prezentas avantaøon kreskigi la landan proponon pri bestaj produktoj kaj havigi pliajn enspezojn al la kamparaj produktistoj.

La membrinoj de la grupo Guemnati aliøis al Monda Fonduso de Solidareco Kontraý la Malsato en decembro 2000. Ili profitas el la kadrado de la NÞO Centro por Produktado kaj Klerigado pri Tropika Bredado PROKLEB/CEPROFET gvidata de nia amiko Romuald SAWADOGO, plenuma direktoro.

La prezidantino de la grupo, S-ino BOLY Tene konfidemas al sukceso de la þafbreda projekto kaj al subtenado de la edzoj, æar æiuj estas bredistoj de multaj generacioj. Tion þi esprimas en la (franclingva) videofilmo je dispono de la Globidaranoj (luprenebla laý simpla peto, kontraý afranko).

La þafbredado prezentas ankaý aktivecon komunan inter tiuj Pulaj virinoj de Burkinio kaj la þafbredistoj en la kalkaj altebena¼oj de Rocamadour en Francio, reprezentataj de S-ro Arcoutel. Tiuj francaj bredistoj pripensadas pri la manieroj subteni siajn inajn samlaboranojn en Afriko. Poste, ankaý la urbeto Rocamadour povus apogi tiun projekton kaj tiel rememori pri sia memdevontiøo kiel « tutmondiøinta komunumo », spiritostato, kiu estigis - ni rememorigu tion, la kreadon de Monda Fonduso de Solidareco Kontraý la Malsato en 1982.

Nia Administra Konsilantaro decidis financi tiun projekton dum sia kunsido en Gemeaux en oktobro 2003. Tamen, ni nepre devas atendi ekhavi sufiæe da mono por pagi la unuan financoparton por la aæeto de tiuj generontoj þafoj el la raso Bali Bali. La bredistinoj de Guemnati esperis aæeti la generontojn en decembro 2003, periodo kiam la bestoj malpli kostas, kaj planis ekrepagi la pruntan parton en decembro 2004. Krom se inter niaj mutualistaj legantoj iuj havus ideojn por plirapidigi la monan enkasigon.

*Romuald Sawadogo, Christian Trianneau*

# Grenstokejo Yancadi en Padema

Projekto n-ro 02.07.BF

Yancadi estas la nomo de grupo en la vilaøo Padema, provinco de Houet je 75 km de Bobodiulaso, dua urbo de Burkinio. La vilaøa grupo Yancadi ricevis la unuan financoparton por la grensktokejo en oktobro 2003. La unuaj kotizoj de la membroj de la grupo datumas de la 10a de julio 2000. La NÞO AKAP/ADRI Asocio por la Kampara Asimilita Progreso per øia plenuma sekretario Dramane TRAORE konsilas kaj kadras la grupon Yancadi de pluraj jaroj kaj plenumas la kontrolon de la projekto al la mutualistoj kunigitaj sine de Monda Fonduso de Solidareco Kontraý la Malsato. Krom la konstruado kaj la provizado de la grenstokejo, la projekto de la grupo Yancadi en Padema strebas al :

- Ø memsufiæeco kaj prinutra sekureco de la loøantaroj ;
- Ø plifortigo de interhelpo kaj de kampara mem-evoluo ;
- Ø malaltigo de aæetkosto de grenoj dum mankperiodo ;
- Ø plibonigo de la vivkvalito de la loøantoj ;
- Ø plidiversigo de la aktivecoj de la grupo ;
- Ø konsistigo de operacia kapitalo.

La vilaøo entenas 4.500 loøantojn, el kiuj æirkaý du trionoj estas enmigrintoj, æefe : Mossi, Puloj, Samo, Dafing kaj Gouroussi. La aýtoktonoj estas Bobo kaj æiuj pace kunloøas.

La grupo Yancadi taskis al si la konstruadon de konstrua‼o kun 50 kvadrataj metroj el daýra materialo, fabrikis la betonbrikojn kaj faris æiujn manlaborojn. Øi petis mondfondusajn pruntodonon kaj subvencion por aæeti galvanizitajn ferladojn por la tegmento, trabojn por la æarpento, cementon por la þmira‼oj, malplenajn sakojn por la grenstokado kaj la cetero utilas kiel operacia kapitalo. La grupo jam posedis trenæaron por la diversaj transportoj. La aæetadoj de grenoj komenciøis tuj post la rikolto en novembro 2003 kaj daýras øis januaro 2004, kiam la prezoj ankoraý ne tro kostas. La konsistigitaj stokoj estos vendataj ekde junio 2004, periodo kiam la prezo ne plu estas atingeblaj de la kamparanoj.

En sia letero de la 21a de novembro 2003 la prezidanto de la grupo Yancadi en Padema Konate Moussa ZOSSIN informis pri la sendado de la fakturoj koncernantaj la utiligon de la unua financoparto al AKAP/ADRI, kiu transsendos ilin en Francion al la volonta administranto taskita per la dosieroj el Burkinio. La prezidanto insiste petis la rapidan pagon de la dua financoparto antaý fino de decembro 2003, kaj anoncas, sub tiu kondiæo, komencan repagon de la prunto ekde decembro 2004.

Vane estus traseræi la ekzaktan devenon de tiuj ambaý financpartojn, kiuj atingis en tiu 2003a jarfino la grupon Yancadi en Padema : certe el parto de la repago de la bananujkampo Dogori en Burkinio, sed ankaý el togolandaj, beninaj kaj haitiaj projektoj, same el individuaj kotizoj de multaj afrikanoj kaj aliaj mutualistoj tra la mondo. Sed certas, ke sen la akurateco de tiuj regulaj repagoj kaj de tiuj individuaj kotizoj la projekto Yancadi en Padema neniam povintus atingi financadon en 2003. Tiu solidareco estis ebla æar tiuj mutualistaj Globidaranoj elektis unuiøi inter si en frata spirito por fariøi pli riæaj, pli sindonemaj, pli efikaj kaj pli respektemaj al siaj samsortanoj.

*Ch.T.*

## Mondfondusa vivo

# Globidar plenumas siajn promesojn.




En Monda Solidareco numero 76 (januaro 2003), prezentante al vi la membrojn de la Administra Konsilantaro, mi promesis paroli al vi pri la korespondantoj de Monda Fonduso. Æu vi pensis, ke mi forgesis vin ! Tute ne, mi, Globidar neniam forgesas vin ; sed tiom multas eventoj en Monda Fonduso, ke mi ne trovis tempon por plenumi mian promeson. Ekkonsciu ! Studi kun iu aý alia tiun aý tiun æi projekton, iri al Eýropa Sociala Forumo kun Alain, Daniel, Danièle aý Jean-Pierre, el kiuj unu raportos al vi en estonta bulteno, ankoraý sekvi ilin kaj Bernard, Christian en kunvenoj pri internacia solidareco, plej prizorgi la ellaboradon de regularo destinita al la estontaj Delegitoj el okcidenta Afriko, kaj ankoraý tiom kaj tiom, ke ja kompreneble mi ne havis liberan tempon por prezenti al vi la korespondantojn de Monda Fonduso. Fidu al Globidar, mi tuj ekos !

Kio do estas korespondanto de Monda Fonduso ? Al kio øi similas ? Kie øi loøas ? Al kio øi utilas ?

Al kio øi similas... mi ekhavas ideon. Mi Globidar jam renkontis kelkajn : Rosa, Bruno, Daniele, Symphorien... "øi" do estas homo, sinjorino, sinjoro, por kiu solidareco estas ne nur ideo sed praktiko, sinjorino, sinjoro, kiu konsentis fariøi peranto inter la Administra Konsilantaro de Monda Fonduso kaj la aliøantoj de sia regiono.

Æiufoje kiam eblas, la korespondanto reklamas por Monda Fonduso, respondas al la demandoj, distribuas dokumentojn, transsendas la informajn kaj financajn petojn al la Administra Konsilantaro. Þi, li, konsentas pri sia enskribiøo en internaciajn jarlibrojn de la NÞO kaj en la interretan paøaron de Monda Fonduso (www.globidar.org). Þia, lia tasko, æiam volonta, estas la frua kontakto, sen decidpovo sed tre grava pri la diskonigo de la ideoj pri mutualismo, kiun praktikas Monda Fonduso de Solidareco Kontraý la Malsato. Þi, li estas ankaý tre utila por provizi la Globidaran familion per senperaj informoj pri kio okazas en þia/lia monda regiono. Nome :

- Ä Agim Peraj, Albanio
- Ä Symphorien Meda, Burkinio
- Ä Bruno Miteyo Nyenge, Kongio, regiono de Kinþaso
- Ä Aime Ruzuba Bisimwa kaj asocio Monda Solidareco - Kune Agadi, Kongio, Kivuta regiono
- Ä Rosa Voltaire, Haitio,
- Ä Catherine de Combrugghe el Solidaraj Popoloj, Belgio
- Ä Daniele Pesce, Italio
- Ä Llibert Puig, Hispanio
- Ä Sabine Hauge, Germanio
- Ä Jawaid Eahsan, Pakistano,
- Ä Mramba Simba, Tanzanio

Jen la korespondantoj de nia mutuala asocio tra la mondo. Volontaj, mi tion rediras, kaj meritoplenaj : perforto, nesekureco, rasismo, æiaj ekstremismoj, diktaturo, mensa mallarøeco, avideco da povo kaj da profito grave malhelpas la serenecon de ilia memdevontiøo. Ili estas la globidar-fortuloj ! Ni substreku, ke kelkaj el ili (el Albanio, Hispanio, Italio, Germanio, Pakistano, Tanzanio) komunikas kun mi per Esperanto.

Tiujn, kiuj jam estas Korespondantoj de Monda Fonduso, mi Globidar respekteme kaj amike salutas ; tiujn, kiuj deziras fariøi tio, kiam ilia regiono ankoraý ne estas reprezentata, mi bonvenigas.

*Globidar*

# EL LA KALENDARO (paøero de nia TTT-ejo www.globidar.org)

## Mondfondusaj aktuala¼oj

- financataj projektoj :
  - ADYD (Senegalio)
  - CBDIBA (Benino)
  - YANCADI de Padema (Burkinio)
  - Grupo "ESTONTECO" en Lome (Togolando)
- strategiaj agadoj :
  - CEIP/CRID
  - 7an de februaro 2004 : unua kunveno de la Konsultiøa Asembleo æe la Kongreso de la Popoloj.

## Informkunvenoj kaj animadoj

- Februaro 2004 : animado en mezlernejo de St-Laurent sur Sèvre (Francio)
- 10a øis 12a de aprilo 2004 : partopreno en la Kongreso de SAT-Amikaro en La Roche sur Yon.
- Aýgusto 2004 : partopreno en la Simpozio de Esperantio en La Chaux de Fonds (Svisio)

## Administrado

- 24an kaj 25an de januaro 2004 : Administra Konsilantaro en Parizo
- 3an kaj 4an de aprilo 2004 : Administra Konsilantaro en St-Benoit, apud Poitiers
- 26an kaj 27an de junio 2004 : Administra Konsilantaro en St-Aubin de Luigné
- 25an kaj 26an de septembro 2004 : Administra Konsilantaro en Cahors ( info@globidar.org )

---

**POR DISKONIGI MONDAN FONDUSON KAJ TIES BULTENON, VI POVAS MENDI :**

ð aliøilojn (senpage)
ð blankajn æemizojn 20 €
kaj blankajn trikotæemizojn 15 €
kun emblemo de Monda Fonduso.
Æiuj mezuroj. + afranko : 3 €
ð la prezentbroþuron de Monda Fonduso (1 €)
ð kovertojn kun la frazo :

*La tero nutrus æiujn homojn*
*se æiu solidare agadus*

100 por 6,80 € + sendkostoj: 3 €
(Ekzistas ankaý en franca lingvo)
ð memglumarkojn (1 € )
ð fotojn (prunto aù aæeto) : projektoj en Burkinio, Benino, Kamerunio, Togolando, Ruando, Kongio
ð multajn aliajn dokumentojn.
ð Protokolo de la Plena Kunsido de Kongreso de la Popoloj. (Esperanta, franca, aý angla.)
Afranko : 2 €

**KOTIZOJ - DONACOJ - ABONOJ - MENDOJ :**

*Kiel pagi ?*

Ä per franca æeko al Globidar
Ä per poþtaj rimedoj, je la nomo de :
MFSCF - MONDA SOLIDARECO
(PÆK-CCP PARIS 10.734.96 Z)

RIP : FR 57 30041 00001 1073496Z020 31

Ä per novaj poþtmarkoj kiel eble sufiæe diversaj, ankaý per monbiletoj enþovitaj en ordinara koverto.

Ä FEL kaj UEA kontoj : mfsk-g

Librotenado je la sama adreso kiel la bulteno

Sur la adresetikedo de la koverto aperas la proksimuma dato de via lasta financa partopreno. (situacio je la 31an de decembro 2003). Tiel ni esperas eviti la poþtajn elspezojn por rememorigoj.

**RICEVITAJ KOTIZOJ kaj DONACOJ**

| | |
|---|---|
| Julio 2003 : | 1 128 € |
| Aýgusto 2003 : | 1 045 € |
| Septembro 2003 : | 1 271 € |
| Oktobro 2003 : | 1 079 € |

*MONDA SOLIDARECO* estas eldonita en Esperanto, kaj franca lingvoj.

**Jara abono : 5 €**

**Partoprenis en la redakcio de tiu numero : :** Alain Cavelier, Daniel Durand, Odile Durand, Bernard Muet, Christian Trianneau, Danièle Charier,

**Desegnoj** : Yasmina Sahraoui, John De La Cruz
**Fotoj** : MFSKM
Elfrancigis Daniel Durand
(revizianto seræatas)
Directeur de la publication : Daniel Durand
CPPAP n-68703. Imprimerie spéciale.

Tel : +33 (0)241 78 47 75
dan.cdm@wanadoo.fr
**http://www.globidar.org**

*MONDA SOLIDARECO*
Les Nids
**FR 49190 St-AUBIN-DE-LUIGNE**
Francio